

TRA LA MONDO KAJ LITERATURO



N-ro 2

Februaro 1950

Do naszych Czytelników

Po wydaniu pierwszego numeru "TRA LA MONDO KAJ LITERATURO" nastąpił krótki okres wyczekiwania, co nam przyniesie korespondencja najbliższych dni i jakim echem odbije się w naszym esperanckim świecie pojawienie się nowego czasopisma, które jest literackim dodatkiem do materiałów przerabianych na Kursie Korespondencyjnym. Już pierwsze listy pełne entuzjazmu dowiodły, że "TRA LA MONDO KAJ LITERATURO" zdało egzamin wstępny. Młodym esperantystom po ukończeniu Kursu Korespondencyjnego bądź też ustnego brakuje niejednokrotnie okazji do dalszego pogłębiania zdobytych wiadomości językowych Esperanto. To właśnie skłoniło nas do wydawania czasopisma przy pomocy którego czytelnicy nasi mogliby wczuć się we właściwą istotę i piękno języka.

Niektórzy czytelnicy dzieląc się z nami wrażeniami, jakie odnieśli po przeczytaniu pierwszego numeru "TRA LA MONDO KAJ LITERATURO", proszą nas, byśmy zastosowali zmiany w samym układzie pisma, inni proszą znów o drukowanie pewnych oryginałów lub przekładów, których nie mogą znikąd otrzymać. Wszystkie spostrzeżenia i prośby naszych czytelników przyjmujemy z radością i postaramy się dostosować do nich. Świadczą one z jednej strony, że treść pierwszego numeru nie została przyjęta bezkrytycznie, z drugiej znów pozwoli nam zorientować się, jakie są życzenia naszych czytelników i dostosować wybór literatury do wymagań ogółu. Na skutek nadesłanych próśb powiększamy objętość przekładu "Pana Tadeusza" do kilku stron w każdym numerze, aby tym samym przyspieszyć skompletowanie całości.

Presitan leteron al instruminstroj
en la tuta mondo

dissendis nia Pariza samideano D-ro Dronchat, por peti kompletan liston de la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata en la koncerna lando, kaj por demandi, ĉu la ministro konsentos ordoni devigan instruadon de Esperanto en altaj lernejoj, kelkaj faklernejoj kaj seminarioj kaj akcepton de Esperanto ĉe iuj ekzamenoj. Samideanoj, al kiuj estos eble tion fari, bonvolu vigle agi en sia lando, por ke la instrueministro respondu al ĉi-lastaj demandoj.

Fervojistaj Esperantistoj kongresos
en Salzburg

Ni informas pri arango de 2-a Kongreso de IFEE kiu okazos la 17 - 21. 5.1950 en Salzburg.

Vieno

la 27-30.5.1950 okazos en Vieno la 4-a Aŭstria Esperanto Kongreso.

Groningen

La 8-10.4.1950 okazos 17-a Kongreso de la nederlanda Esperanto-unuiĝo "La Estonto estas nia".

Edinburg

En Edinburg Esperantistoj aranĝis ekspozicion de Esperantaĵoj, daŭrinta 4 tagojn. La ekspozicio sukcesis varbi por esperanto-movado 40 novajn membrojn. Oni malfermis tuj du esp.-kursojn. Pri tio multe raportis tieaj gazetoj.

Kansas City /Usono/

Unity School of Christianity, 917 traok Kansas City 6, Missouri, eldonas siajn librojn en 15 diversaj lingvoj je eldonnombro ĝis miliono da ekzempleroj. Oni klarigis al esp.-rondoj ke ili povas eldoni librojn ankaŭ en Esperanto se montriĝus intereso por tio en esp.-movado. Tial eble utilos, se el diversaj landoj venos /al la supre nomita adreso/ petoj pri prospekto en Esperanto.

U N O raportas pri multlingva diskonigo de Universala Deklaracio.

Kiam la Generala Kunveno de la Unuiĝitaj Nacioj proklamis la Universalan Deklaracion de Hom-Rajtoj en Parizo, la 10-an de decembro 1948, ĝi voĉdonis ke tiu grava dokumento estu diskonigita tra la tuta mondo.

Unu jaron poste la Sekretariejo de UNO en Lake Succes fiere raportis en sia

Gazetara Bulteno SOC/807 /8 dec.1949/, ke "dum la pasinta jaro la Deklaracio estas publikigita kaj disdonita ne nur en kvin oficialaj lingvoj de UNO: angla, ĉina, franca, hispana kaj rusa, sed ankaŭ en birmana, dana, ESPERANTA, finna, germana, greka, irlanda, japana, macedona, nederlanda, norvega, persa, portugala, serbo-kroata, sinhala, slovvena, sveda, tagaloga, tamila kaj turka lingvoj."

Pli ol 1.500.000 ekzempleroj ĝis nun estas eldonitaj kaj "disdonitaj pere de registaroj, UNO-delegitaroj, specialaj agentejoj, organizoj, informcentroj, gravaj ĵurnaloj, radio-stacioj, universitatoj, bibliotekoj kaj lernejoj", la bulteno raportis. Ĝi ankaŭ menciis fonografdiskojn en ĉina, angla, franca kaj hispana lingvoj, filmstrioj, radio-kaj televid-programojn kaj ekspoziciojn pri la Deklaracio.

Ĝis nun aperis 5500 ekzempleroj de la Esperanto-eldono de la Deklaracio: 2500 en "Amerika Esperantisto" kaj 3000 kiel aparta 8-paĝa broŝuro. /el Heroldo/

P A R I Z O 1950 j.

35-a Esperantista Universala Kongreso okazos en belega kaj grandega urbo Parizo. La urbo de pentristoj, revo de studentoj, sopiro de elegantulinoj ĉiulandaj... Pri arango de la Kongreso ni ankoraŭ skribos.

Tel - Aviv

Okazis je 9-10 de oktobro 1949 la unua Landa Esperanto-Kunveno de Izraelo en Tel-Aviv

Detroit /Usono/

En la urbocentro de Detroit dum la monato decembro /1949/ staris grandega afiŝo sur la supro de 8-etaĝa konstruaĵo, lumigata vespere per multaj elektraj lumoj, kaj videbla el ĉiuj ĉefstratoj ĝis distanco de duonkilometro. La literoj estis unu metron altaj. La teksto estis - GAJA KRISTINASKO -

/el ESPERANTO

El Okcidenta Afriko, Madagaskaro kaj aliaj kolonioj oni sciigas, ke multe da nutraĵoj, kiel kafo, oranĝoj, bananoj ktp., putriĝas en mardeponejoj. Sipoj ne venas por transporti ilin al Eŭropo. Tamen tie oni zorgas, ke estu manko.

En Francujo oni eksportas la troon de tritiko; do, oni havas abundon da ĝi. Kial oni metas branon kaj maizon en nian panon?-diras francoj-. /Heroldo/

70 Li rekonis eĉ lignan ŝrankon kun malnova
Ludhorloĝo, staranta ĉe l' enir' alkova,
Kaj, kun infana gojo, li ektiris ŝnuron
Por aŭdi la malnovan Dombrovski-mazuron. 1/

Li, trākuraĉte domon, ĉambron serĉis vane,
Kie, antaŭ dek jaroj, li loĝis infane.
Li enkuras, reniras, vidas mirigita:
La ĉambro por virino estas arangita!
Kiu loĝas? La onklo ne havis edzinon,
Petersburg' antaŭ jaroj gastigis onklinon.
Nek estas mastrinejo. Jen la klavikordo!
80 Sur ĝi notoj kaj libroj, sed ĉio sen ordo,
Senzorge disĵetita: agrabila senplano!
Tiel ĉion disĵetis ne maljuna mano.
Jen, el hoko prenita robet' blanke brila!
Por vestigo etendas ĝin seĝ' apogila.
Sur fenestroj en potoj aromas floretoj:
Geranio, levkojo, astroj, violetoj.

El fenestro li novan miraĵon ekvidis:
Ĉe l' frukt-arbaro, kie urtikoj insidis,
Nun estis vojetara ĝardenet' malgranda
90 Kun florbukedoj, mento, herbo anglolanda.
De l' eta, ciferforme ligita barilo
Brilis da' helkoloraj iekantetoj milo;
Ĉe l' freŝe surverŝita bedaro ĝardena
Staris ankoraŭ lada vazo, akvoplana;
Ĝardenistino tamen nenie vidiĝas;
Ŝi eliris, ankoraŭ pordet' balanciĝas,
Jus puŝite: sur sablo jen de piedeto
Postsigno: ŝi sen ŝuo estis, sen ŝtrumpeto.
100 Sur sablo delikata, seka, blanka pure,
Postsigneto preciza, vi divenos: kure
Ĝin ĉi tie malgrandaj piedetoj lasis
De iu, kiu teron tuŝetante, pasis.

Li longe en fenestro staris, meditante,
Per aromaj blovetoj de floroj spirante.
La vizeĝon li klinis ĝis la violetoj,
Per okuloj scieme vagis sur vojetoj;
Kaj li ree al etaj postsignoj revenis,
Pripensante, al kiu ili apartenis.
110 Li levis la okulojn: sur tabul' barila
Staris juna knabino; vesto, blanke brila,
Ĝis la brusto nur kovras figuron gracian,
Ne kaŝante la ŝultrojn, cignan kolon ŝian.
Tiel vestite, sole por matena iro,
Litvanino neniam vidiĝas al viro.
Do, eĉ sen atestanto, per manoj-surmeto
Sur bruston, ŝi aldonis ŝirmon al robeto.
La haroj, ne en bukloj, sed node-tordite
Kaj, en blankaj papero-silikvoj, kaŝite,
Mirornamis la kapon, ĉar, de sun' radia,
120 Ili lumis per nimbo ĉielana ia.

1/ Dombrovski-mazurko, kanto de la polaj legionoj, batalintaj, sub la
generalo Dąbrowski, por Napoleono en Italujo /1797/, la fama "Ankoraŭ
Polujo ne pereis"; jen ĝia unua strofo:

"La Polujo ne pereis, dum ni vive spiroj;
Kion fremda forto prenis, ni per fort akiros.

Marŝu, marŝ', Dombrovski! el itala lando
Al patruj' nin gvidos via ĉefkomando!"

Vizago - nevidebla. Al kampo turnite,
 Si iun serĉis fore, malsupre. Subite
 Si ekvidis, ekridis, kaj, manojn plaŭdinte,
 Kiel bird', el barilo sur herbon, fluginte,
 Tra-l' ĝardeno, tra floroj, ŝi paŝis en kuro.
 Sur tabul', apogita ĉe la ĉambra muro,
 Antaŭ ol li rimarkis, ŝi flugis facile
 Tra-l' fenestro, subite, mallaŭte, lunbrile.
 Trilante, ŝi robeton kaptis, kaj ŝpegulon
 130 Enrigardi kuretis. Vidinte junulon,
 Si faligis robeton - pala de hororo
 Kaj miro. Li ekflamis per roza koloro,
 Kiel nubo, renkonte kun maten'-aŭroro.
 Li modeste okulojn kovris, ekbalbutis,
 Volis sin senkulpigi, sed nur klinsalutis
 Kaj reniris. Virgino ekkriis dolore,
 Malklare, kiel ido, sonĝe timigita.
 Li time rerigardis; ŝi jam estis fore;
 Lia kor' laŭte batis, kaj li, konfuzita,
 140 Eliris, ne sciante mem, ĉu la renkonto
 Estas ĉi de rido, de ĝojo aŭ honto.

Dume oni rimarkis bone en bieno,
 Ke antaŭ dom' okazis nova gast-alveno.
 Jam al stalo ĉevalojn forkondukis oni
 Kaj ne avaris, fojnon kaj avenon doni.
 Jugist' ne volis novan modon rekomendi:
 Gast-ĉevalojn al juda gastejo forsendi.
 Servistar' ne eliris saluti respekte,
 Ne tial, ĉar ĝi servis en domo neglekte,
 150 Sed nur, ĉar ĝi atendis de Vojski l' alvenon:
 Li ekster dom' arangis vesperan festenon.
 Li anstataŭas mastron; se mastro 'as fore,
 Gastojn li mem akceptas kaj amuzas kore;
 /Dom-amiko de-l' mastro, forparenco ia./
 Vidinte gaston, kuris li al ĉambro sia;
 /Li ne povis renkonte iri en tolvesto/
 Do li prenis rapide vestaĵon, por festo
 Preparitan, ĉar sciis li ekde mateno
 Ke li kun multaj gastoj sidos ĉe-l' festeno.

160 Vojski al gasto brakojn etendis de fore,
 Kaj krie ĉirkaŭprenis lin kaj kisis kore.
 Rapide kaj konfuze ili ekparolis:
 Kelkjaran historion vort-resumi volis
 Flej mallonge; demandojn sekvis rakontado,
 Ekkrioj, ekscipiroj, nova salutado.
 Kiam Vojski demandis kaj esploris ĉion,
 En fino li rakontis tago-historion.

"Bone, mia ĉadeuŝ" /ĉar la juna homo
 Estis bapte nomita per Kosciŭŝka nomo,
 170 Pro sia milittempa naskiĝo, memore/
 "Bone, mia ĉadeuŝ, vi venis ĝusthore,
 Ĉar ni havas en domo fraŭlinar'-ĉeeston.
 Onklo por vi pripensas jam edziĝofeston.
 Do elektu; arigas societo granda
 Ĉe ni, de kelkaj tagoj, pro juĝo limranda, 2/

1/ Vojski /tribuno/, antaŭe en Polujo oficisto, kies devo estis, gardi
 la sekurecon en la konfidita al li distrikto, kaj zorgi pri la edzinoj
 kaj infanoj de l' nobelaro dum la milito. Tiutempe /j.1811/estis nur
 titola. 2/ Limjuĝo estis juĝo, kiu ekskluzive decidis procesojn pri bien-
 limoj. Ĝin plenumis la ĉambelano /kamerestro/, supera oficisto de l'dis-

Por fini kun la Grafo malnovan proceson.
La Grafo, morgaŭ veni mem, donis promeson.
Cambelan' l/ kun edzino, filinoj, jam venis.
Junular' ĉaspafilojn en arbaron prenis;
180 Maljunuloj, virinoj rikoltatan grenon
Rigardante, atendas junular'-revenon.
Se vi volas, renkontos ni apud arbaro
Onklon, Geĉambelanojn kun sinjorinaro.

Vojski kun Tadeuŝo al arbaro iras,
Kaj ĉiam satparoli ankoraŭ deziras.
Suno al ĉiellimoj aliradis laste,
Malpli forte ol tage, sed lumis pli vaste,
Tutruĝa, kiel sanā vizag' de kampulo,
Kiu finis laboron sur grenkampe sia
190 Kaj revenas ripozi. Jam rondo radia
Falas arbaran supron; krepuska nebulo
Jam la pintojn kaj branĉojn de arboj plenigas,
Kaj tut-arbaron kvazaŭ kunverŝas kaj ligas;
Arbaro nigras, kvazaŭ domo grandegulo,
La suno ruĝas, kiel sur tegmento brulo;
Ĝi falis suben, jetis tra branĉegoj brilon,
Kiel kandel' tralumas fenestro-kovrilon,
Kaj estingiĝis. Tiam en greno falĉiloj
Sonantaj, kaj en herbo ŝovataj raŝtiloj
200 Silentis, haltis: tiel ordonas Juĝisto;
Ĉe li, kun tago finas laboron kampisto.
"Kiel longe labori, Mondoestro diras;
Kiam la suno, Lia laborist', foriras,
Ankaŭ kapolaboron devas fini homo".
La sinjoro Juĝisto paroladis jene.
Lian volon respektas sankte ekonomo,
Ĉar eĉ veturigiloj, ne ŝargitaj plene,
Kun duona garbaro al garbej' veturas;
Bovoj, pro nekutima malpezo, ĝojkuras.

210 Jus el arbaro iris tuta societo,
Gaje, orde. Antaŭe, infanoj-areto
Kun guvernist'; Juĝisto kun Cambelanino;
Cambelan', ĉirkaŭita familia-krone;
Post ili la fraŭlinoj; junular', en fino,
Flanke, post la fraŭlinoj, eble paŝ-duone.
/Tion ordonas deco/. Neniu parolis
Pri ordo, kaj neniu vicordon kontrolis,
Kaj ĉiu, malgraŭvole, la ordon observis,
Ĉar Juĝist' malnov-morojn en domo konservis.
220 Por aĝo, nask', prudento, ofico, respekton
Flegante, ne toleris li ĝian neglekton.
"Orde, li diris, staras domo kaj nacio,
Senorde ili falas, kaj pereas ĉio."
Do al ordo kutimis anoj de la domo,
Servistoj, gast', parenco, kaj eĉ fremda homo;
Ĉar, se iu vizite al Juĝisto venis,
Li baldaŭ la kutimon de l' domo alprenis.

La Juĝisto salutis kore nevon sian,
Donis por kiso mamon, kisis frunton lian,
230 Sed parolis malmulte, pro gastoj laŭvide;

trikto, en loko de disputo, kaj li verdiktis, kolektinte ĉiujn dokumentojn
l/Cambelano /kamerestro/, antaŭe supera dignulo kaj oficisto en sendependa
Polujo; li plenumis devojn de la reĝa kortego. La distrikta cambelano juĝ-
is limprocesojn /vidu supre/. Sub iama rusa regado tiu ĉi ofico perdis si-
an signifon kaj restis nur titola.

Tamen la larmoj, kiujn li viŝis rapide
Per tranĉita maniko de sia kontuŝo, 1/
Vidigis lian amon al Pan Tadeuŝo.

Post la mastro al korto iris sekvantaro:
El rikolto, herbejo, paŝtejo, arbaro.
Tie interpretigas la safoj blekante,
Kaj densan polvan nubon sur vojo levante;
Kaj poste, malrapide paŝas, kun latuna
Tintilar', la tirola bovinaro juna;
Jen el herbejo kuras ĉevaloj henante.
240 Ĉio al put', al ĝia ligna brako, kuras,
Kiu knare en trogojn trinkaĵon mezuras.

Juĝisto, kvankam laca, kaj inter gastaro,
Gravan devon de mastro ne lasis pretere;
Li iris mem al puto. Plej bone vespere
La mastro vidas staton de sia brutaro.
Li neniam inspekton fidus de servulo,
"Ĉar la brutaron nutras de mastro okulo".

Kun Vokisto 2/ Protazo, Vojski, ĉe kandelio,
En vestiblo disputis, iom en kverelo;
250 Ĉar, dum forest' de Vojski, Vokisto sekrete
El dom' forigis tablojn, jam kovritajn prete,
Kaj rapide starigi en kastel' ordonis,
Kies ruinojn rando de l'arbaro zonis.
Vojski, pro la transportoj malkontenta, iris
Pravigi al Juĝisto. Juĝisto ekmiris,
Jam ne povante ŝanĝi, preferis en fino,
Sin ekskuzi kaj gvidi gastojn al ruino.
Vokist', dumvoje, ĉiam al Juĝist' klarigis,
Pro kio li disponon mastran aliigis:
260 En domo ne ekzistas ĉambro tiel vasta,
Por tiel estiminda, granda aro gasta;
En kastel' as vestiblo, bone konservita,
Arkajo sendifekta, unu mur' fendita,
Fenestroj, sen vitraĵoj, ne ĝenas somere,
Proksimeco de keloj oportuna vere.
Sed li dume Juĝiston per okul' sciigis,
Ke li pli gravajn siajn kaŭzojn sekretigis.

Dumil paŝojn post domo estis situita
Kastelo, grandioze, vaste konstruita,
270 De Horeŝko antikva hered' familia.
Li mem pereis en la temp' insurekcia;
La bienojn detruis sekvestraj ediktoj,
Senordo de l' zorgado, kaj juĝaj verdiktoj.
Parencoj de l' patrina flank' heredis parte,
Kreditoroj la reston dividis aparte.
Neniu volis preni dum kalkul' kastelon,
Kies subten' per kostoj troŝargus nobelon.
Sed la Grafo, najbaro, post plenkresko sia,
Riĉa sinjor', Horeŝka forparenco ia,
280 El vojaĝoj veninte, eksatis la murojn,
Klarigante gotikan la arĥitekturon;
Kvankam Juĝist' asertis, laŭ antikva plano,
Ke arĥitekt' ne Goto estis, sed Vilnano.

1/ Kontuŝo /kontusz/, longa nobelara supervesto kun distranĉitaj manikoj.
2/ Vokisto /Woźny/, antaŭe malsupera juĝa oficisto en Polujo; lia devo
estis disporti juĝajn invokojn, anonci verdiktojn k.t.p. Tiun ĉi oficon
plenumis kutime la nobeletaro.

/El Schiller./

Tre multe homar' kun espero en koro
Pri vivo estonta parolas,
Kaj ĉiam al celo feliĉa kaj ora
Aliri plej baldaŭ ĝi volas.
Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras, -
Sed homo esperon senĉese adoras.

Espero kun li sen-aparte vivadas;
Ĝi knabon dorlotas, junulon
Per sorĉa radio ĝi gaje logadas,
Konsolas ĉe tomb' maljunulon:
Li tre lacigita per vojo de tero,
Foriras en tombon kun dolĉa esper

Ho, ne! ĝi ne estas elpenso malvera,
Per revoj malsagaj naskita!
Ni scias, ni sentas kun kredo sincera,
Ke estos esper' plenumita.
Kaj tiu ĉi sento ĉu estas kapabla
Nin trompi en nia revaĵo agrabla ?

V. DEJATNIM.

Husaro

/El Puŝkin /

Ĉevalon sian li purigis,
Estante forte kolerega,
Kaj diris: "min diablo ĝis
En loko loĝi malbonega!

Ni ĉiam tie ĉi restadas
En turka kvazaŭ batalado:
Nur solan supon ni mangadas
Kaj eĉ ne pensas pri drinkado.

Kaj mastro tie ĉi malbona,
Malbonan havas li edzinon....
Nek via skurĝ' nek vorto bona
Admonas tie ĉi virinon !

Jen urbo Kiev ! Lando kia !
En buŝon falas mem buletoj,
Kaj vinon havas domo ĉia,
Kaj kia tie virinetoj !...

Ne estas eĉ domaĝ', je Dio,
Sin mem pro ili pereigi !
Malbone estas nur per tio " "
- Per kio ? volu min sciigi ! -

Kaj li komencis plibonigi
Lipharon. "Eble ne timulo,
Li diris, estas vi, sed ĝi
Vin miri povas mi - spertulo.

Aŭskultu: regimento nia
Ĉe Dnepro larĝa enlokiĝis.
Mastrino estis bona mia,
Kaj tombon ŝia edz' foriĝis.

Kun ŝi mi baldaŭ amikiĝis;
Ni vivis pace, tute bone.
Al mi Mario humiligis,
Ne diris vorton eĉ malbone.

Se mi malsobra estis tute,
Ŝi mem min zorge kuŝigadis;
Ŝi ĉiam tute sendispute
Je ĉio tuj mem konsentadis.

Feliĉan vivon mi pasigis,
Kaj longe tiel vivus eble, -
Sed jen subite ĵaluzigis
Min io, - mem diabl' kredeble.

Mi pensis: kial baptanino
Sin levas nokte ? kion volas ?
Tre juna estas ŝi virino,
Kaj tial eble ŝi petolas !...

Mi observadi ŝin intencis.
Jen foj' ne dormis mi /en korto
Jam estis nokto, kaj komencis
Bruegi vent' kun granda forto/.

Kaj vidas mi: ŝi forrampetis,
De forno prenis ŝi karbĉeton,
Min tre facile pripalpetis,
Disblovis apud forn' fajreton;

Ŝi ekbruligis kandleton,
Kun ĝi angulon ŝi foriĝis,
De tie prenis boteleton,
Sur balailon ŝi sidiĝis;

Ŝi senvestiĝis kaj, sorbinte
El boteleto, ŝi tra tubo,
Sur balailo sidiĝinte,
Tuj malaperis, kvazaŭ nubo.

- Si eble estas sorĉistino, -
Mi pensis kaj de forn' rapidas,
Por vidi sorĉon de virino;
Kaj jen mi boteleton vidas;

Mi flaris: ia acidaĵo....
Mi plankon ŝprucis el botelo:
Forflugis - kia mirindaĵo ! -
Kaj forna forko kaj sitelo !

Sub henko katon mi ekvidis,
Sur ĝin mi ŝprucis el botelo
Ĝi ternis tuj kaj ekrapidis
Subite fornon post sitelo.

Sur ĉion ŝprucis sen kompto
Jam mi per tuta forto mia, -
Kaj ĉio: tablo, benko, poto
Forflugis unu post alia.

Al ili mi ne volis cedi
Kaj trinkis mem per unu fojo
Restaĵon... Ĉu vi povas kredi?
Mi ekaperis tuj en vojo:

Mi flugas, - kien? mem ne scias,
Kun forto tranĉas nur aeron,
Al steloj mi: "pli dekstren" krias...
Kaj jen ekfalas mi sur teron.

Jen mont'. Sur ĝi kaldronoj bolas,
Kaj oni faras ian ludon.
Kantadas, fajfas kaj petolas,
Kun granda ran' edzigas judon.

Mi kraĉis... Flugas jen Mario:
"For! hejmen kuru, petolulo!
Vin oni tuj formangos!..." - Kio?!
Nu, mi ne estas timemulo!

Min ne timigu! Kie vojo
Al hejmo estas? - "Jen sidiĝu
Sur forman feron, - kun malĝojo
Respondas ŝi, - kaj tuj foriĝu!"

Vi volas, ke husar' sidiĝu
Sur forman feron?! Baptanino,
Mi petas vin, ne frenezigu,
Ne estu ja malsagulino!...

Ĉevalon!... "Prenu, malsagulo!"
Ŝi efektive diris veron:
Jen antaŭ mi ĉeval'-bravulo
Per hufo forte batas teron.

Sidiĝis mi kun brava vido
Sur ĝin kaj trovi bridon penas,
Sed vane! Rajdas mi sen brido -
Kaj tuj al forno mi alvenas.

Kaj jen mi tion saman vidas...
Ĉevalo tute jam forestis,
Kaj mi sur benko rajde sidas...
Jen kia strang'okazo estis!"

Kaj li daŭrigis plibonigi
Lipharon. "Eble ne timulo,
Li diris, estas vi, sed igi
Vin miri povas mi spertulo."

V. DEVJATNIN

Tri Budrys'oj

/El Mickiewicz /

Budrys, forta kaj sana, maljunulo Litvana, sur la korton alvokas tri filojn;
"Iru tuj en la stalojn, selu bone ĉevalojn, kaj akriĝu la glavojn, ĵetilojn.
Kuras famo en rondo, por tri flankoj de l'mondo al ni Vilno trumpetas ordono:
Olgerd falos Rusujon, Skirgell iros Polujon kaj princ' Kejstut atakos Teutonon.
ortaj, sanaj vi estas; iru, filoj, mi restas; Litvaj dioj konduku vin, benu!
or la vojo utila bona vorto konsila: tri vi estas, tri vojojn vi prenu.

nu devas elkuri, kun Olgerdo veturi kontraŭ Novgrod post Ilmen kuŝanta;
ie voŝtoj zibelaj; la ĉarnamoj tre belaj, en amasoj la rublo sonanta.

na devas elfali, sub Princ' Kejstut batali: pereadu Krucistoj-hundfratoj!
aj sukces² tie ora, drapo mire kolora, brilantoj en pastraj ornattoj.

Tria post la Njemeno, en Skirgella la treno, nur malriĉan akiron li trovos;
tie inda nur havo: bona ŝildo kaj glavo, Kaj Polinon kunpreni li povos.

Super ĉiuj virinoj, plej amindaj Polinoj! gajaj, kiel la junaj katetoj;
Blanka, roza la vango, kvazaŭ lakto kaj sango, la okuloj - brilantaj steletoj.

El Poluj' mi junaĝa, batalanto kuraĝa, antaŭ jaroj alportis edzinon...
Jam ne batas la kor'o - kun malĝojo, doloro rememoras mi vian patrinon."

aj, doninte konsilojn, li benadis la filojn; la armitajn forportis ĉevaloj.
ĉatun'-vintro sin trenas, filoj reen ne venas; eble falis en sangaj bataloj..

er la neĝo kovrita, rajdas viro armita, sub la burko objekto tre granda.
Filo! sub la mantelo rusa mon' en sitelo?" - "Ne, patreto, filino Pollanda!"

er la neĝo kovrita, rajdas viro armita, sub la burko akiro tre granda.
El Prusujo! sak' plena, kun la sablo sukkena! - "Bofilino, patreto, Pollanda!"

er la neĝo kovrita, tria viro armita, ion grandan li kaŝas sub vesto:
Budrys jam ne atendis, invitadi li sendis por la tria edziĝa la festo.

esperantigis A. Grabowski

- Certe, sinjoro, sed ne alĵetu ilin sur la teleron de l' malnobleco, ĉar en Egipto ĉiuj altranguloj rigardas la prenadon de koruptumoj kiel kutimon tiel ĝeneralan kaj tiel konvenan al la antikva tradicio egipta, ke ili prenas ilin kun tute pura konscienco.

- Vi estas prava, kaj, kiel dio egipta, mi ne devis tion forgesi. Do mi ne alĵetos ion sur iun teleron, antaŭ ol vi diros, kiamaniere agis Tutnetaŭgis, kiel ministro de l' Faraono?

- Egipto, kiel vi scias, ho Justulo, bezonis grandajn kaj fundamentajn reformojn. Jen Tutnetaŭgis, fariginte ministro, klopodis antaŭ ĉio, ke tiuj reformoj ne estu grandaj kaj fundamentaj, sed malgrandaj kaj supraĵaj. Egipto bezonis novajn kaj saĝajn homojn, kiuj estus amikoj de la supre eluditaj reformoj. Tutnetaŭgis konfidis ilian plenumon al la malnovaj, malsaĝaj oficistoj, kiuj estis iliaj malamikoj. Kia karikaturo kaj kia malutilo farigis el tio por Egipto, tion facile komprenos ne nur tiel penetranta prudento kiel la via, ho sinjoro, aŭ, kiel la menso de l' krokodilo, kio aŭ ibiso, sed eĉ la ordinera, malprofunda animo de l' homo. Tutnetaŭgis estis tro malkapabla, por kompreni, ke la ŝtato devas esti rekonstruita de la fundamentoj ĝis la pinto, kaj tro malmulte honesta, por enkonduki konsciencen eĉ tiujn ŝanĝojn, kies necescon konfesis kaj komprenis la Faraono mem.

- La ibiso min piedbatu - ekkriis Oziris, alĵetante ŝarĝetojn sur ambaŭ telerojn - se mi scias, kiu el ili fine superpezos.

Kaj la vortoj de l' Saĝeco fluis plue:

- Li trompis egale la Faraonon, kiel la popolon. Al la Faraono li minacis, ke la popolo ribelos, kaj al la popolo li inokulis la konvinkon, ke la Faraono volas ĝin teni en mallibereco. Li iom malvastigis la povon de l' Faraono, sed ne plivastigis la liberecon de la popolo. Dum lia tempo pligrandigis la malsateca mizero en Egipto kaj la lando pleniĝis de rabistoj.

- Glor' al dio, tio estas, glor' al mi mem! - ekvokis Oziris - tie-ĉi almenaŭ ne ekzistas jam ia dubo, ke tio estas plej evidentaj kanajlaĵoj.

- Ho! ne nur kanajlaĵoj - rediris kviete la Saĝeco - ĉar Tutnetaŭgis montris ĉe tio malpli da prudento, ol ĝin posedas la veziko de kamelo. Liaj faradoj estis malbon-aŭguraĵoj, sed li mem estis malsaĝulo, kaj lia malsaĝeco estis tiom pli granda, ke li mem opiniis sin saĝa. Li ne estis kapabla kompreni, ke, kie oni bezonas grandan kreskan politikon, tie ne povas sufiĉi brokantado, kaj li ŝakris, ŝakris senfine.

- Vere! vi estas prava, kiel ĉiam, kaj nur tiel preciza pesilo, kiel la mia, povas montri al ni, kion oni devas fari kun li.

- Kelke da vortoj mi devas ankoraŭ aldoni, ho Ĉiegloboforma! Tutnetaŭgis mokis Egipton, ne zorgis pri la Faraono, klopodis ĉiam nur por si, sekve oni povus opinii, ke li estis nur kanajlo. Sed konsideru tamen, sinjoro, ke, se Tutnetaŭgis estus reginta saĝe kaj honeste, tion profitus Egipto, profitus la Faraono, kaj li mem ne sole ne perdus ion el la propraj profitoj, sed farigus ankoraŭ pli potenca, kaj la juĝo de l' historio pri li estus tute alia.

- Sekve vi ree volas diri, ke tamen la azeno superpezdis en li la friponon?

Levu, ho Justulo, la pesilon, kaj ni tuj konvinkigos.

.....

Oziris levis la pestelerojn kaj tenis ilin alte, ĝis ili tute trankviligis. Poste li ekrigardis, kaj la miro kaj kune ankaŭ la kon-

fuzeco speguliĝis sur lia dia vizaĝo.

- Je l'sankta vosto de l' Apis! - li ekvokis - la malsaĝeco kaj la friponeco ne superpezas unu la alian eĉ je unu haro el mia barbo. Kion fari nun!...

Kion fari!...

La Asturokula forĵetis la pesilon, ĉirkaŭprenis sian kapon per la manplatoj kaj duonfermis la okulojn.

Tamen post momento lian vizaĝon heligis radia rideto, kaj, turninte sin al Tutnetaŭgis, li komencis paroli malrapide kaj sole:

- Ekscelenco! Neniu el la grekaj, feniciaj, nek el la ĉi-ti-eaj pli junaj dioj scius, kion fari kun vi, ĉar vi vidas, ke eĉ la Saĝeco skrapetas en tiu-ĉi momento sian kapon.

...Sed ne vane la dioj kaj la homoj nomas min ĉiopova, ĉar jen per mia ĉiopoveco mi distranĉas, kvazaŭ per la glavo de l' Faraono, ĉiujn malfacilecojn kaj anoncas al vi la sekvantan verdikton:

...Revenu al la vivo kaj revenu sur la teron. Estu ĝis la fino de l' mondo la ministro de la Faraonoj kaj diversaj popoloj: klopodu, turnu, konduku, prezidu, regu...

...Kaj kiam pleniĝos la jarcentoj, fine devas montriĝi, ĉu vi estas pli granda fripono, aŭ ezeno...

...Tiam ankaŭ mi scios, kiu el la ambaŭ spiritoj devas al preperi eternan rezidencon.

Tion dirinte, li turnis Tutnetaŭgison vizaĝe al la ĉiela ŝtuparo kaj per subita eksvingo de sia dia piedo plirapidigis lian revenon sur la teron.

En la abismoj de la eterneco ekregis profunda silento; sed Egipto preparis evidente ovacion al la reviviginta Ekscelenco, ĉar ĝis la pordegoj de la ĉielo komencis alflugi la ĥoraj voĉoj, kantantaj ĝoĝe:

-- Tutnetaŭgis! Ho, Tutnetaŭgis!

La Saĝeco komencis ridi mallaŭte.

Esperantigis
A. Grabowski.

Sciencistaj informoj

Ultraviolaj sunradioj plimultiĝas

Zorgaj mezuradoj, faritaj pere de oraj kaj arĝentaj lumŝirmilij en la Monto Wilson Observatorio, montras, ke la povo de la ultraviolaj sunradioj iom post iom dum la lastaj jaroj pliintensigis. En kelkaj monatoj ĝia povo estos duobligita kontraŭ tiu de la mezuroj je la komenco, t.e. antaŭ kvar jaroj.

Grosoj kreskigitaj per elektreco

Du natursciencistoj en Francujo en kelo kreskigis kaj maturigis grosojn pere de elektreco. Ĉi tiuj beroj ŝajne estas de eksterordinare delikataj aromo kaj gusto. Daŭris kvardek tagoj, ĝis kiam ili estis maturigitaj; la spezoj por ĉiu bero sumiĝas je mil frankoj. Estis uzataj du lampoj po 1200 vatoj, fiksitaj ĉirkaŭ 1.25 metrojn super la kreskaĵo.

El la mezuroj de la kosmo

Se ni enpense plimalgrandigus la mezurojn de ĉiuj steloj /kompreneble ankaŭ nian sunon/ dimensie je pizeroj /diametro 0.5cm./ tiam en tiu skalo la diametro de nia tuta sunsistemo estus egala je 20 metroj.

Preskaŭ en la sama momento la prefekto de l'urbo ĵetis antaŭ sin ruĝan tukon, kaj ĉe tiu ĉi signo la pordaj kroĉiloj antaŭ la imperiestra podium ekgrincis kaj el la malluma kavo eliris sur la helan arenon Ursus.

La grandegulo palpebrumis blindigita de la lumo; post momento li iris sur la mezon de l'areno kaj rigardis ĉirkaŭe, kvazaŭ volante ekscii, kontraŭ kio li devas batali. Ĉiuj aŭgustanoj kaj la plimulto da publiko sciis, ke li estas la viro, kiu sufokis Krotonon. Murmuro eksonis sur ĉiuj benkoj. En Romo ne mankis gladiatoroj, kies kresko multe superis la ordinaran homan altecon, sed tian koloson neniam ankoraŭ vidis la okuloj de l'kviritoj. Cassius, kiu staris sur la podium post Cezaro, ŝajnis kompare kun la Ligo malgranda hometo. La senatoroj, vestaloj, Cezaro, aŭgustanoj kaj la popolo rigardis kun admiro de kompetentuloj kaj amantoj liajn potencajn femurojn, dikajn kiel brancegoj, lian bruston, similantan du kunigitajn ŝildojn, liajn herculesajn brakojn. La murmuro pli kaj pli laŭtigis. Por ĉi tiu homamaso ne povis ekzisti pli granda ĝuo, ol vidi tiajn muskulojn streĉitajn en batalo. La murmuro fariĝis krio. Ĉiuj demandis, kie loĝas la popolo, kiu naskas tiajn grandegulojn. Ursus staris en la mezo de l'amfiteatro, nuda, pli simila al ŝtona koloso, ol al homo, kun etentema kaj samtempe malĝoja mieno de barbaro. Vidante, ke la areno estas malplena, li mire rigardis per siaj bluaj okuloj de infano jen la publikon, jen Cezaron, jen la kradojn de l'c u n i c u l a, de kie li atendis siajn ekzekutistojn.

En la momento kiam li iris sur la arenon, lia simpla koro lastfoje pli forte batis de l'espero, ke la kruco lin atendas, sed kiam li ekvidis nek krucon, nek pretan kavon, li pensis, ke li ne indas ĉi tian favoron kaj ke li estas mortonta alie, kredeble inter la dentoj de sovaĝaj bestoj. Li estis sendefenda kaj decidis morti, kiel konvenas al la adoranto de "Safido", trankvile kaj pacience. Dume li volis preĝi al Savinto, li do ekgenuis sur la areno, kunmetis la manojn kaj levis la rigardon al la steloj, kiuj brilas tra la supra malfermo de l'cirko.

Lia konduto ne plaĉis al la rigardantoj. Oni vidis jam sufiĉe da kristanoj, kiuj mortis kiel ŝafoj. Oni komprenis, ke se la grandegulo sin ne defendos, la spektaklo malsukcesos. Tie ĉi kaj tie eksonis sibloj. Oni komencis voki la mastigoforojn, kies devo estis vipi la malkuraĝajn batalantojn. Sed post momento ĉio eksilentis, ĉar neniu sciis, kion faros la grandegulo, kiam li renkontos la morton, okulo kontraŭ okulo.

Oni ne longe atendis. Subite eksonis laŭtege kupraj trumpetoj kaj post ĉi tiu signo malfermiĝis la kradoj kontraŭ la imperiestra podium kaj sur la arenon sin ĵetis kolosa germana uro, portanta sur la kornoj nudan virinan korpon.

- Ligio ! Ligio ! - kriis Vinicius.

Li ŝiris la harojn sur la tempioj, kurbiĝis kiel homo, kiu eksentis en sia brusto la pinton de lanco kaj komencis ripeti per rauka, nehoma voĉo:

- Mi kredas, mi kredas! Kristo, miraklon!

Kaj li ne sentis, ke Petronius kovris lian kapon per la togo. Ŝajnis al li, ke la morto aŭ doloro blindigas liajn okulojn. Li ne rigardis, li ne vidis. Sento de terura malpleno ĉirkaŭis lian animon, en lia kapo restis neniu penso, nur lia buŝo ripetis, kvazaŭ freneze:

- Mi kredas ! Mi kredas ! Mi kredas !

Subite eksilentis la amfiteatro. Kvazaŭ unu homo ekstaris la aŭgustanoj, ĉar io eksterordinara okazis sur la areno. La humila kaj preta morti Ligo, ekvidinte sian reĝidinon sur la kornoj de l'sovaĝa besto, eksaltis kiel brulvundita kaj kurbiĝinte komencis kuri sub angulo al la furiozanta uro.

El ĉiuj brustoj elŝiriĝis mallonga krio de l'mirego, post kiu eksilentis la cirko. La Ligo dume atingis la ŝaŭmantan beston kaj kaptis liajn kornojn.

Boris, Boris! Ĉion mi komprenas, ĉion mi sentas!

- Vi translogiĝis? - interrompis lin la filo por ŝanĝi la temon.

- Jes, mi translogiĝis. Ĉiunokte mi faras tiĉn. Mia maljuna kun sia karaktero ne povas longe vivi sur la sama loko.

- Mi vizitis vin en la antaŭa loĝejo por inviti vin kamparon. Pro via sano estus bone por vi vivi iom en freŝa aero.

- Ne! - eksvingis la manon la maljunulo. - Mia edzino ne konsentos, kaj mi mem ne volas. Jam cent foje vi provis eltiri min el la marĉo, ankaŭ mi mem provis, sed sen rezultato. Forlasu tion. Lasu min morti en la marĉo. Jen mi sidas ĉe vi, vidas vian, anĝelan vizaĝon, kaj tamen io tiras min hejmen en la marĉon. Tia estas mia sorto. Ne metu sterko-skarabon sur rozon. Ne. Jam tempo estas, filo, por mi; mallumiĝas.

- Atendu momenton, mi akompanos vin. Ankaŭ mi devas esti hodiaŭ en la urbo.

La maljunulo kaj la filo surmetis la paltojn kaj eliris. Kiam ili post kelke da minutoj sidis en fiakro, estis jam mallume kaj en la fenestroj ekbrilis lumo.

- Mi rabis vin, Borenka! - murmuretis la maljunulo. - Malfeliĉaj, malfeliĉaj infanoj! Granda estas la ĉagreno havi tian patron!... Boris, mia anĝelo, mi ne povas mensogi, kiam mi vidas vian vizaĝon. Pardonu... Kia estas mia senhonteco! Mia Dio! Mi ĵus rabis vin, hontigas vin per mia drinkula vizaĝo, morgaŭ mi hontigos same viajn fratojn!... Kaj se vi vidus min hieraŭ! Mi ĝin ne kaŝos, Borenka! Hieraŭ venis al mia edzino najbaroj, ĉiaspecaj mallaboremuloj, mi drinkis kun ili kaj komencis kalumnii vin, miajn infanojn. Mi insultis vin, plendis, ke vi min forlasis. Mi volis piorigi la ebriajn virinojn kaj ludi rolon de l'malfeliĉa patro. Ĉiam mi faras tiamaniere: kiam mi volas kaŝi miajn malvirtojn, mi kulpigas pri ĉio miajn senkulpajn infanojn. Mi ne povas mensogi al vi, Borenka, kaj kaŝi la veron. Mi iras al vi fanfaronante, sed kiam mi vidis vian delikatcon kaj kompatemon, la lango gluigis al la palato kaj en mia konscienco la supro venas suben.

- Ĉesu, paĉjo, ni parolu pri aliaj aferoj.

- Jesu-patrino, kiajn infanojn mi havas! - daŭrigis la patro, ne aŭskultante la filon. - Kian donacon mi ricevis de Dio!... Ne ĉifono, kiel mi devus havi tiajn infanojn, sed vera homo kun animo kaj koro! Mi tion ne indas.

La maljunulo demetis sian malgrandan ĉapon kaj kelkfoje faris la signon de l'kruc.

- Gloro estu al Vi, Dio! ĝemis li, rigardante ĉirkaŭe kaj kvazaŭ serĉante religion pentraĵon. - Rimarkindaj, maloftaj infanoj! Iri filojn mi havas kaj ĉiuj estas samaj. Sobraj, seriozaj, agemaj kaj kiel saĝaj! Veturigisto, kiel saĝaj! Gregorio sola havas saĝon por dek. Li scias francan, li scias germanan lingvon kaj parolas... kion valoras viaj advokatoj kompare kun li! eterne vi dezirus lin aŭskulti... Infanoj miaj, infanoj, mi ne kredas, ke vi estas miaj! Mi ne kredas. Vi, Borenka, estas martiro... Mi ruinigas vin kaj mi ruinigos vin... Sen fino vi donas al mi, kvankam vi scias, por kio mi elspezas la monon... Antaŭ kelke da tagoj mi sendis al vi plendan leteron, priskribante mian malsanon, kaj ĉio estis mensogo: mi petis de vi monon por rumo. Kaj vi donas al mi, ĉar vi timas ofendi min per la rifuzo. Ĉion ĉi mi komprenas kaj sentas... Griŝa ankaŭ estas martiro. Jaŭde mi venis al li en la oficejon, ebria, malpura, en ĉifonoj... odoranta brandon kiel drinkejo. Rekte al li mi venas, tia figuro!... Mi parolas al li maldelikate, kaj ĉirkaŭe staras liaj estroj, kolegoj, petantoj... kia honto! Sed li tute ne konfuziĝis, nur iom paliĝis, ekridetis, venis al mi, kvazaŭ nenio okazis, eĉ prezentis min al la kolegoj. Poste li akompanis min ĝis mia hejmo, eĉ per unu vorto ne riproĉis min! Via frato Saŝa, li ja ankaŭ estas martiro! Li edziĝis, vi scias, kun la filino de regimentestro el aristokrata rondo, ricevis doton... Oni povus supozi, ke mi estas indiferenta por li. Ne, tute ne! Tuj post la edziĝo min unuan li vizitis kun sia juna edzino... En mia kaverna...

La maljunulo ekploris, sed tuj ridante daŭrigis:

- Kaj ĝuste tiam mi mangis raŭanon kun k v a s kaj rostitajn fiŝojn, kaj en la ĉambro tia malbonodoro estis, ke li naŭzis la diablon. Mi kuŝis

/daŭrigota/

Amekeloj

EL UNU PREDIKO

Vivis iam homo tre malbona kaj peka. Li premis ĉiun, kiun li povis, li al neniu helpis iam eĉ per unu centimo. Manante sin en la larmoj de multaj siaj oferoj, li tamen vivis feliĉe, kaj la tera justeco lin ne atingis. Sed jen li mortis. Gojaj, ke ili liberigis de li, la heredantoj faris al li belegan enterigon. Sed apenaŭ oni lin metis en la teron, la tero tuj elĵetis returne la korpon de la pekulo. Vidante, ke la tero ne volas akcepti la malbenitan korpon, oni decidis forbruligi ĝin per fajro; sed ankaŭ la fajro kun abomeno forsaltis de la korpo kaj ne volis eĉ tuŝi ĝin. Ne povante al si helpi, oni ĵetis la korpon al hundoj, ke ili ĝin dissiru; sed ankaŭ la hundoj kun indigna bojado forkuris de la korpo kaj ne tuŝis ĝin. Oni ĵetis la korpon en profundan marĉon, por ke la koto ĝin kovru kaj ripozigu, sed la korpo restis super la marĉo kaj eĉ unu koterio ne volis aliĝi al la peka korpo... Nun, miaj aŭskultantoj, tiu ĉi terura ekzemplo servu al vi kiel instruo! Estu bonaj, honestaj kaj piaj, kaj tiam vi povos esti tute certaj, ke la tero vin prenos, fajro vin bruligos, hundoj vin disŝiros kaj koto kovros vin en granda amaso!

MALFELIĈA KOMERCISTO

Juna homo, kiu en sia urbo havis nenian okupon, venis Londonon, por serĉi helpon ĉe unu sia parenco. Tiu ĉi lasta donis al li kelkan nombron da ĉapo kaj konsilis al li stari sur la strato kaj vendi ilin. Goja, ke li nun povas iom perlabori, la junulo prenis la ĉapojn kaj iris kun ili sur unu homplenan straton kaj sidigis en unu oportuna anguleto. Vespere li revenas al la parenco, kaj tiu ĉi demandas: Nu, ĉu vi multe vendis? - Ha, malgaje respondas la junulo, eĉ unu ĉapon mi ne vendis! - Ĉu vi al neniu proponis? - Kion do vi faris la tutan tagon? - Mi tenis la ĉapojn bone kaŝitajn en mia korbo, por ke la polvo ilin ne malbonigu, sed proponi al iu mi ne trovis okazon en la daŭro de la tuta tago, ĉar el la granda amaso da homoj, kiuj pasas antaŭ mi, ĉiuj jam havis ĉapojn sur la kapoj.

PROCESO

En unu societo oni demandis pentriston, kiel oni povas la plej reliefe prezenti du procesantojn, el kiuj unu gajnis la proceson kaj la dua ĝin perdis. - Mi pentrus la unuan en ĉemizo kaj la duan nuda, respondis la pentristo.

TELEGRAMA STILO

Juna edzino naskis filinon. La edzo volis sciigi la patron de sia edzino pri tiu ĉi fakto, aldonante, ke la fakto havis lokon en la sepa horo matene kaj ke poste per letero li skribos pli detale. Li telegrafas: "Hodiaŭ matene sepa filino naskita. Poste pli."

KION ONI AMAS PLEJ MULTĈE ?

Havante unu jaron - sian nutristinon; kvin jarojn - la patrineton; dek jarojn - la lernan libertempon; dek ses jarojn - la liberecon; dudek jarojn - sian amatinon; tridek jarojn - sian edzinon; kvardek jarojn - siajn infanojn; sesdek jarojn - sian oportunecon; sed en ĉiuj tempoj - ??? - sin mem.

MIRINDAĴO EN LA MEDICINO

En unu societo oni parolis pri medicino. Unu el la alestantoj diris, ke la unua montrilo en la plej multaj malsanoj estas la lango kaj se la lango estas kovrita, tio ĉi jam montras, ke la homo ne estas sana. - Kaj tamen, rimarkis alia, mi konas unu sinjorinon, kies lango ĉiam estas kovrita per tre dika tavolo da ĉikanoj kaj kalumnioj kaj tamen ŝi estas tute sana.

NAPOLEONO III KAJ BENEDETTI

Napoleono III ofte mokadis siajn korteganojn. Tiel li diradis al Benedetti, lia konata ambasadoro, ke li havas bovan vizagon. - "Mi ne scias, Via Imperiestra Moŝto, respondis unu fojon Benedetti al tiela serĉo, ĉu mi efektive havas vizagon de bovo, sed mi tre bone scias, ke mi multajn fojojn prezentadis vian personon, kaj ĉiam kun tiu ĉi sama vizago, kiun mi nun havas."



R I D O SAMI GAS



Tri muŝoj

Senzorge, gaje flirtadis tri muŝoj, en butiko de spicyvendisto. Ili vigle zumis, ĝoje ili ĝuis la vivon; ili ja pri nenio suferis manĝojn. Jen ili malsatiĝis; oni devis tag-mangi. Ĉiu el ili, laŭ sia gusto, volis el-ekti bonan manĝaĵon. La unua surflugis sur far-unon; ĝi satiĝis, sed ho ve! ĝi mortis post kelkaj minutoj. Ĉar la faruno estis falsita. La dua surflugis sur konfitaĵon; ĝi satiĝis, sed, ho ve! ĝi mortis post kelkaj minutoj. Ĉar la konfitaĵo estis falsita. La tria surflugis sur muŝmortigilon; ĝi satiĝis, kaj poste ĝi vigle kontente forflugis. Ĉar ankaŭ la muŝmortigilo estis falsita.

Tifo aŭ miliono?

- Kion vi preferus havi, tifon aŭ milionon? - Kia sensencaĵo! Milionon, kompreneble. - Kaj vi estus malprava, ĉar la milionuloj mortas ĉiuj, kaj el la tifuloj nur tridek procentoj.

Kion la Turkoj rakontas.

La du ŝtelistoj. - Du ŝtelistoj venis en domon, por ŝteli, kaj iris en ĝi por eltrovi tiom da objektoj, kiom ili povos kapti kaj forporti, ĉiu en alia direkto. Kiam unu el ili, hazarde, estis kaptita de la domposedanto, li kriis al sia kamarado: "Ho, venu tuj ĉi tien! mi kaptis viron..." La alia rekriis: "Se vi lin kaptis, alvenigu lin al mi". Sed tiu respondis: "Li ne venas kun mi." Kaj tiam lia kamarado rediris: "Se li ne volas veni, venu vi sola", - li reparolis: "Kiamaniere mi povus veni, amiko? li ja ne ellasas min!"

NIAJ LEGANTOJ SKRIBAS

Post la dissendo de l-a N-ro de nia nova monatrevo "TRA LA MONDO KAJ LITERATURO" - al Polaj Esperantistoj, ni ricevis multajn entuziasme skribitajn leterojn. Manko de libera loko malebligas citi la aliajn. Jen du el ili:

Estimataj Samideanoj! Kun granda ĝojo mi ricevis vian belan revuon. "Tra la Mondo kaj Literaturo", kies interesege enĥavon mi legis kun vera plezuro. Bonega ideo, kia tutmeritas apogon de ĉiuj, precipe polaj esp-istoj! Bone kompreneble, ke la ekzistado kaj plua progreso de la revuo grandparte dependas de sufiĉa nombro da abonantoj, do mi komencis viglan varbadon inter Esperantistoj de nia urbo. Dezirante al la Komitato prosperon en ilia plen-oferebla laboro, mi restas kun plej sinceraj s-anaĵ salutoj. Fr. Walas. Bielsko n/Sl. Ciesz.

Al Redakcia Komitato de "Tra la Mondo kaj Literaturo" en Varsovio. Entuziasme mi tra legis tiun ĉi novan valoran gazeton kaj tuj mi decidis abonon ĝin, ĉar dank' al ĝi, ni junaj esperantistoj ekkonos ĉefverkojn de monda literaturo, tradukitajn en Esperanton. Pro tio mi dankas al Red. Komitato kaj deziras pluajn sukcesojn en laboro por tiu grava afero. H. Dąbrowski, Jawor, Dolny Śląsk.

En leteroj estas insistaj petoj de la Legantoj ke ni presu pli da teksto de "Sinjoro Tadeo" ol du paĝoj en ĉiu n-ro. Ni do presos kvar paĝojn de nun, laŭ ilia, por ni agrabla deziro. Red.

Ĉiu pola Esperantisto estu abonanto de "Tra la Mondo kaj Literaturo"

V a r b u, V a r b u p o r Ĝi!

"TRA LA MONDO KAJ LITERATURO" estas eldonata por gelernantoj de Esperanto. Jarabono 480 zł. aŭ 10 rpk. /ankaŭ esp.-libroj egalvalore/ Konto PKO I-7736/11 Warszawa, St. Roman /Administrator/ - Redaktas Komitato - Redaguje Komitet Warszawa, ul. Marszałkowska 81/32. Powielono na prawach rękopisu.